



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Subtena la informan

laboron !

Abonu Pilo-Press

Jarabono 30,- GM

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 20/1976 - 17 majo 1976

Aperas ĉiusemajne

Antaŭ 70 jaroj

Germanlingva Esperantista Societo fondita

Nürnberg (pp) - Antaŭ 70 jaroj, la 19-an kaj 20-an de majo 1906, estis fondita dum la unua germana Esperanto-kongreso en Braunschweig la "Germanlingva Esperantista Societo", la hodiaŭa Germana Esperanto-Asocio.

Por memori pri tiu datreveno, ni citas el raporto pri la kongresaj laboroj en "Germana Esperantisto" (junio 1906) verkita de Jean Borel, redaktoro de tiu revuo:

"Ni antaŭ ĉio povas diri kun rajtigita kontenteco, ke la sukceso de la kongreso de Braunschweig estas plena kaj, ke oni tie faris bonegan kaj utilan laboron, el kiu naskiĝis la jam de longe intencita kaj atendita "Germanlingva esperantista Societo" (Deutschsprachliche Esperantisten-Gesellschaft). La diversaj germanaj grupoj sendis delegitojn aŭ igis sin reprezenti; multaj bondeziraj leteroj kaj telegramoj alvenis el ĉiuj lokoj.

Sub la lertega prezidado de Sro Dro Mybs la gravaj kaj ofte nefacilaj laboroj de la kongreso rapide antaŭeniris kaj dum la malmultaj disponeblaj horoj oni sukcesis starigi la tutan regularon de la nova societo je plena kontentigo de ĉiuj. Inter ĉiuj kongresanoj kaj dum la tuta diskutado regis senĉese la plej kora kaj amika interkonsento. El la akceptitaj decidoj ni citos la jenajn:

La Societo estos oficiale registrita, laŭ la germana leĝaro. Ĝiaj organoj estos: 1e centra aga komitato de 3 membroj elektitaj por tri jaroj kaj 2e ĝenerala konsilantaro kunmetita de almenaŭ 20 membroj elektitaj el ĉiuj partoj de germanlingvaj landoj. (....)

La unua centra komitato estas jena:

Prezidanto Sro Dro E. Mybs, Altona a. E., Marktstrasse 68
Sekretario Sro Dro J. Hanauer, Frankfurt a. M., Bleichstr. 5
Kasisto Sro Fr. Schuck, Braunschweig, Thomastrasse 16

Tiu ĉi bonege kunmetita estraro certigas al la nova societo frukton donan agadon kaj sukceson dum ĝia unua periodo de ekzistado kaj ni plene konfidis, ke la sorto de nia germanlingva societo ne povus esti en pli bonaj manoj.....

Krom la estraro de agado ekzistas honora estraro de eminentuloj, kiuj faris servojn al la esperanta afero. Unua devo de la nova societo estis elekti nian karan Majstron, Dron Zamenhof, kiel honoran prezidanton.

La jara kotizaĵo estas fiksita je 3 Markoj por ĉiuj membroj; la membroj pagantaj almenaŭ 100 Markojn estos ĉiamaj anoj. Tiu ĉi pagas 10 Markojn estas bonfarantoj.....

La kongreso de Braunschweig enmetas gravan, feliĉan daton en la historion de Esperanto. Vivu la nova Germanlingva esperantista Societo! Ĝi multe helpu por la baldaŭa triumfo de nia kara Esperanto."

Novajoj el "Bona Espero"

Bona Espero (pp) - Ursula Grattapaglia per letero de la 76-04-29 informas: "La vojoj al Bona Espero plibonigis - traktoroj, kamiono kaj laboristoj faris verajn miraklojn. Ili estis senditaj de la ĝenerala direktoro de la federacia departemento de aŭtovojoj, dr. ing. Nid Dutra d'Amorim! La "flughaveno" nun vere havas grandiozan aspekton kaj la indigenoj kaj ŝevaloj sovaĝaj estas tre 'disorientigitaj'...."

Lastatempe naskiĝis bela bovidino de nederlanda raso, naskiĝis anasidoj - kiuj 'iras al la akvo laŭ rutin', kiel diras la kanto - kaj kokidoj.

Nia nova, unua kaj unika gimnazio en Alto Paraiso funkcias bonege."

11-a Brazila Seminario de Esperanto

Brasilia (pp/ug) - De la 15-a ĝis la 18-a de julio 1976 okazos en Brasilia la 11-a Brazila Seminario de Esperanto sub la patroneco de guberniestro Elmo Serejo Parias, kiu oficiale kaj solene akceptis la organizan komitaton kaj deklaris, ke konsideras honoron grandan esti elektita kiel Patrono de la kunveno.

Oni disponigis al la seminario 150 senpagajn lokojn (litoj, ĉiuj manĝoj kaj transportoj) kaj pliajn 100 dormlokojn. La televido kaj la ĉefaj ĵurnaloj raportis grandskale pri la evento. Estus dezirinde, ke multaj eksterlandanoj partoprenu la seminarion.

ROMOLO kunvenis en Frankfurt

Frankfurt/M (pp) - La Rhein-Main-Ligo Esperantista okazigis sian printempa kunvenon sub la devizo "Greklando" en greka restoracio de Frankfurto, dimanĉon, la 9-an de majo. Ĉirkaŭ 50 personoj ĝuis la intiman atmosferon de la restoracio Rhodos, precipe la tipajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kun senaltruda greka muziko en la fono. Du sonfilmoj, kiujn disponigis fraŭlino Lambridu de la greka trafikoficejo, informis pri historio kaj pejzaĝa beleco de la lando, kaj Richard Hirsch pliprofundigis la temon per propra kolorfilmo kaj diapozitivaj pri la arkeologie interesa insulo Kreta.

Komuna kvizludo, ellaborita kaj prezentita de Elisabeth Ritterspach, leĝere interrompis kaj spicis la programon: 35 demandoj pri la Universala Kongreso, pri grekaj geografio kaj mitologio kaj pri la olimpikaj ludoj provokis aktivan kunlaboron de ĉiuj ĉeestantoj, kaj la gajnintoj povis fiere hejmenporti libropremiojn disponigitaj de la Esperanto-societo Frankfurto kaj de la greka trafikoficejo. (ge-ri)

Esperanto-Ekspozicio en Schwabmünchen

Schwabmünchen (pp) - En Gesamtschule (lernejo) Schwabmünchen okazas Esperanto-ekspozicio dum la semajno de la 17-a ĝis la 24-a de majo. La ekspozicio, kiu montras parton de la materialo el la Augsburga ekspozicio, estas komuna aranĝo de la urbo, lernejo kaj popolaltlernejo; ĝin instalas Gerald Tucker, faka instruisto por la angla lingvo. Cetere, Gerald Tucker ankaŭ instruas Esperanton al kelkaj lernantoj de la lernejo; ili vizitis kaj rigardis la Esperanto-ekspozicion en Augsburg kaj partoprenis provlecionon.

IBRA Radio en Esperanto

Marde, la 18-an de majo, je la 21,30 horo (MET) sur ondo longo 49,55 m (6 055 kHz) ĉi tie en Nürnberg estis bone aŭdebla la Esperantoprogramo de IBRA Radio. La programo estas nomata "La Ĝoja Espero" kaj temas pri kristanaj aferoj. Kvankam oni ne anoncis la nomon de la parolanto, tamen la voĉo estis al mi konata. Mi supozas, ke parolis Erik Carlén, Svedio. Oni skribu al Ibra Radio, Box 396, S-101 25 Stockholm, Svedio.

Augsburg - elirpunkto de nova vojo

Augsburg (pp) - Augsburg povas fariĝi elirpunkto de nova vojo sur la kampo de informado kaj varbado. Mi jam organizis multajn ekspoziciojn, ankaŭ kadre de aliaj grandaj ne-esperantaj ekspozicioj, ekz. ĉe Didacta, Nürnberg, lerneja ekspozicio Dortmund, junulara ekspozicio en Kolonjo, sed la ĉi-jara ekspozicio pure Esperanta - multe diferencis de la ĝisnunaj.

Veniam antaŭe ni disponis pri tiom ampleksa spaco - 600 kv. metroj - en facile alirebla publika domo, la urbodomo de Augsburg en la urbo-centro. Io nova estis la provlecionoj, sukcesa eksperimento. Montrigis ke homoj volonte partoprenas en tiaj provlecionoj, kiujn preparis Gerald Tucker, faka instruisto pri la angla lingvo, kaj lia edzino Stefanie. Entute okazis 49 provlecionoj, kiujn gvidis ges-roj Tucker, Rudolf Kratzmann kaj Hermann Schmid.

25 personoj sin anoncis por Esperantokurso, kaj pli ol 30 personoj aĉetis lernolibrojn kaj vortarojn. Sed plej okulfrapa estis la fakto, ke neniu el la pli ol 2400 vizitantoj aĉe aŭ moke parolis pri Esperanto. Tiu ekspozicio certe kontribuis al plialtigo de la prestiĝo de Esperanto. Ĝi elradiis en tuta nia lando de Lindau al Bremen, de la okcidento al la oriento, kiel pravas alskriboj direktitaj al la urba administracio.

La ekspozicio kostis multe da mono, sed la informa valoro estas pli alta. La pozitivaj informoj en televido, radio kaj gazetaro kostus, se ni devus ilin pagi, minimume 30 000 GM. Sen troigo oni povas diri, ke per la amasmedioj oni alparolis certe 500 000 homojn aŭ eĉ pli.

Kion nun pensas la aranĝantoj kaj deĵorantoj de la ekspozicio?

Hermann Schmid, la respondeculo pri financaj aferoj kaj loka organizanto: "Mi povas konstati, ke niaj klopodoj ne nur ne estis vanaj, sed eĉ sufiĉe sukcesaj."

Margarete Schmid, helpema, komprenema edzino de Hermann Sch.:

"Dum la Germana Esperanto-Ekspozicio 1976 en Augsburg ni konstatis, ke ni multe pli da homoj atingis ol pere de kongresoj. Ĉu nova vojo?"

Gerald Tucker, aŭtoro de la provlecionoj: "Kun la espero, ke niaj provlecionoj fariĝos integra parto de estontaj ekspozicioj, mi konstatas ke la laboro por tiu eksperimento ne estis vana."

Steffi Tucker, kunaŭtorino kaj gvidantino de provlecionoj: "Mi esperas, ke la Germana Esperanto-Ekspozicio 1976 en Augsburg fariĝis granda sukceso. Tamen mi ĝojis labori por ĝi, ĉar por Esperanto ĝi valoris."

Rudolf Kratzmann, gvidanto de provlecionoj: "Mi estas konvinkata, ke la ekspozicio kontribuis tre amplekse al plua informado pri la I. L. Esperanto kaj mi dezirus, ke oni okazigu almenaŭ ĉiun duan jaron similan ekspozicion en ĉiam alia urbo en Germanujo kaj - laŭeble - eksterlande."

Ludwig Pickel, kunaranĝanto: "Dum tago mi deĵoris en Augsburg, dum nokto mi estis en Nürnberg. Mi veturis 700 km per aŭtomobilo kaj 5000 km per trajno. Tamen la ekspozicio valoris la streĉon kaj laboron. Estas mia deziro, ke la ekspozicio fariĝu modelo por nia estonta informa kaj varba agado."

Kaj D-ro Ludwig Röhl, Günzburg, kiel vizitanto opinias: "Mirigite pri la ampleksa kaj multplanka ekspozicio, mi dankas al la organizintoj. Ĉiu trovis ion interesan."

Je la fino ni volas esprimi dankon al la urbo Augsburg kaj al la honora protektanto de la ekspozicio, ĉefurbestro Hans Breuer, sen kies materia kaj morala subteno la ekspozicio ne estus povinta okazi.

10-tagaj ekskursoj tra Pollando
valoraj objektaĵaj premioj

atendas la eksterlandajn aŭskultantojn de la Pola Radio, kiuj respondos al jenaj demandoj:

- Kion vi scias pri la vive, problemoj kaj rolo de la juna generacio de la nuntempa Pollando? Kiel oni aprezas en via lando la junan generacion kaj kiajn perspektivojn oni ligas kun ĝi?
- Kian signifon havas, laŭ via opinio, la internaciaj junularaj aranĝoj? Ĉu vi partoprenis en tiaj - se jes, kiajn impresojn vi elportis?
- Kiel vi aprezas la disaŭdigojn de la Pola Radio, dediĉitajn al la problemaro de la juna generacio? Je kiuj demandoj /temoj/ kaj kiel oni devus pliriĉigi tiujn ĉi disendojn?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn oni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 15-a de junio 1976 j. /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultojn ni anoncos en la disendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 30-an de junio 1976 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras sukceson en lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio elsendas en Esperanto:

Je la 6,00 h sur 31 m, 49 m, 75 m, 200 m

Je la 16,30 h sur 31 m kaj 41 m

Je la 22,30 h sur 49 m, 75 m, 200 m